



**Eŭropa Festivalo  
de Esperantaj Kantoj**

Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

Europejskie  
Centrum  
Edukacji  
Międzykulturowej



**VROCLAVO** urbo de renkontiĝoj

Honora Patronado de la Prezidanto de Vroclavo

**ilei**



## LA 8-A EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ OKAZIS ĈI-JARE RETE

Ĉi-jare la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj pro kronviroza pandemio estis organizita rete kun subteno de la Urbo Vroclavo. La festivalo okazis kun speciala dediĉo al **MILA VAN DER HORST-KOLIŃSKA**, kiu ekde komenco de la festivalo subtenis ĝian disvolviĝon. Reta organizo de la kantfestivalo estis multe pli malfacila ol preparado ĝin en pasintaj jaroj. La organizantoj devis subigi amason da malfacilaĵojn, kiel ekz. mallongigon de la laborgrupo pro malsano, lernadon de novaj ĝis nun ne konataj iloj, akceptadon de manko de komunaj renkontiĝoj pro pandemio, ĉar kunlaborantoj loĝis en aliaj urboj kaj eĉ landoj kaj cetere oni devis venki multajn neatendite naskiĝantajn problemojn ... Malgraŭ tio la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj estis sukcesplena. La festivalo, ĉi-jare vere **estis ne nur eŭropa sed monda**. Partoprenis en ĝi multaj esperantistoj el diversaj anguloj de la mondo, el Japanio, Brazilo, Ĉilio, Kolombio, Uzbekio, Pollando, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Svislando, Izraelo.

Sufiĉis nur aliĝi kaj poste sendi filmeton kun kanto **en Esperanto**. Ĉi-jare estis tri kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto, 3. enstudia registraĵo. La aĝkategorioj estis la samaj kiel en pasintaj jaroj: 0-18 jaroj / 19-54 jaroj / 55-111 jaroj. La ĵurio, la aro da internaciaj specialistoj – esperantistoj kaj muzikistoj – pro escepta situacio pritaksis ĉefe lingvan kaj muzikan korektecojn. En kelkaj kategorioj la ĵurio decidis ne aljuĝi la unuan aŭ eĉ duan premion, se la kvalito de la kantoj lingve aŭ muzike ne atingis la akceptatan minimumon. Plie estis aljuĝita la Ĉefpremio. Bedaŭrinde, pro teknikaj kialoj ĉi-jare oni rezignis pri aljuĝo de la Publik-premio.

La rezultoj estis anoncigitaj dum la filma **Koncerto de Premiitoj**, kiu okazis la 12-an de septembro, je la 16:00 horo, rete. La organizantoj unufoje preparis la koncerton je tiu formo kaj tio ankaŭ estis malfacila tasko des pli, ke ĝi estis farita sub la premo de tempo. Ĉi-jare kiel gastoj elpaŝis fama jOmO el Francio kaj la pola ensemblo NaRaz el Góra. La pola ensemblo ekestis pasintjare speciale por nia unua Esperanta turneo por rekomendi la urbon Vroclavo pere de la lingvo Esperanto en diversaj landoj kun traduko en la lokan lingvon.

Honoran patronecon pri la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj akceptis Jacek Sutryk - la Prezidanto de Vroclavo, Bohdan Aniszczyk - la Prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, EUROKKA kaj Juna Amiko kaj Varsovia Vento kaj pola retradio KSON. La Radio KSON fondis belan premion. Ĉiu premiito en la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj havas eblon doni intervjuon en la radio KSON kaj prezenti sian repertuaron. Belan donacon al la premiitoj fondis ankaŭ vroclava artistino, Elżbieta Wodała donacante siajn flortipaĵojn t.e. ciferecajn grafikojn de bildoj faritaj el elementoj de sekigitaj plantoj.

Je la nomo de la organizanto, la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado mi ankoraŭfoje elkore gratulas ĉiujn partoprenintojn, precipe la premiitojn. Mi tre dankas al la juĝantoj pro ilia grava kaj ege malfacila laboro.

Mi jam invitas vin partopreni venontjare, en la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

Małgorzata Komarnicka  
Ĝenerala direktoro de  
Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj